

Kolokvo pri la adapto de UN al la hodiaŭa mondo
okazinta en Nico (Sudfrancio) la 27/29-ajn de majo 1965, 6-a parto
Claude Gacond, 146-a radioprelego, 1966.07.20 & 1966.07.23

Cl.- Atentu esperantistoj! Ĉi tie vi aŭdas la Svisan Kurtondan Radiostacion. Parolas gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond.

Ni daŭrigas la raporton pri la Nica Kolokvo, kiu pasintjare studis, kiel Unuiĝinta Naciaro adaptiĝu al la hodiaŭa mondo. La problemo de la monda ekonomia kreskado montriĝis rapide ligita al la problemo de la malarmado. Kaj tiu temo malarmado – ekonomia kreskado prezentiĝas kiel la hodiaŭaj ĉefproblemoj.

A.- Sinjoro Jules Moch, franca eksministro kaj eksdelegito ĉe UN, kiu estis petita raporti pri la malarmado, komencis sian prelegon dirante, ke adaptiĝo al la hodiaŭa mondo signifas por Unuiĝinta Naciaro esti kapabla liberigi la mondon de la angoro kaŭzata de la armada konkuro.

Cl.- Li aldonis, ke la problemo de la malarmado estras tiun de la promocio de la subevoluintaj popoloj. Samtempe ĝi estas ligita al la problemo de la armada tekniko. Tial lia raporto dividiĝas en tri ĉapitroj. Unue li prezentis la progreson de la armada tekniko. Due li raportis pri la provoj al malarmado. Trie li priskribis la rilatojn inter la malarmado kaj la subevoluo.

A.- Pro la aktualeco de tiu raporto ni dediĉos du elsendojn al ĝi. Kio sekvos estos preskaŭ nur citaĵoj el Jules Moch.

Cl.- Tiu fama eksministro vidas periodojn en la armada historio. La unua periodo daŭris jarmilojn kaj povas esti nomata periodo de **individua detruo**. Poste dum malpli ol du jarcentoj, post la invento de la klasika eksploda obuso, la homaro konis la **metiistan detruon**. En 1945 la **serian detruon** stampis la eniron en la atoma epoko. De 1953 la homaro ekkonas la **universalan detruon** dank'al la termonuklea tekniko.

A.- Usona ministro pri defendo avertis la deputitojn de la Ĉambro de la Reprezentantoj dirante, ke nuklea konflikto kun Sovetio signifus por Usono almenaŭ cent-milionojn da mortintoj dum la dek unuaj minutoj de la konflikto.

Cl.- Sinjoro Jules Moch demonstris, ke dum la du unuaj periodoj milito ebligis gajnon. La venkanto ĉerpis riĉaĵojn el la venkito. Karakteriza trajto pri la tria periodo estas, ke milito ne plu pagas. Ĝi ruinigas same la venkanton, kiel la venkiton. Nun, en la kvara periodo, milito signifas nur mortintojn. Ne plu estas venkanto, nek venkito, kaj la konfliktoj devas ĉesi antaŭ la minaco de la termonukleaj bomboj.

A.- Sinjoro Jules Moch rimarkigas, ke oni alvenas al la samaj konkludoj, se oni ekzamenas la necesan kvanton da eksplodiloj por detrui tutan landon. Per la rimedoj uzataj dum la dua mondmilito en Eŭropo, por neniigi Francion 120 milionoj da tunoj de klasikaj bomboj estus estintaj necesaj. Per atombomboj de la tipo uzata por detrui Hiroŝimon en 1945, ses mil bomboj nuligus la vivon en Francio. Nun 15 termonukleaj bomboj mortigus la tutan loĝantaron en Francio kaj en la najbaraj landoj. Jen la progresado en la scienco pri universala mortigo.

Cl.- La teknikaj konsekvencoj: Unue artileriaj problemoj ne plu ekzistas. Trafpovo de la ĵetitaĵoj ne plu gravas pro uzo de interkontinentaj rakedoj. La problemo pri trafcerteco ne plu ekzistas pro la vasteco de la detrusurfaco. La problemo de la pafrapideco ne plu ekzistas, ĉar kelkaj bomboj nuligas tutan popolon. La nevundebleco de la ĵetodeklivoj ankaŭ ne plu estas problemo. Bombsatelitoj povas esti orbititaj jam dum pactempo. Post koda aŭtomata ordono ili falus ien ajn sur la planedon.

Kolokvo pri la adapto de UN al la hodiaŭa mondo
okazinta en Nico (Sudfrancio) la 27/29-ajn de majo 1965, 6-a parto
Claude Gacond, 146-a radioprelego, 1966.07.20 & 1966.07.23

A.- La fakulo pri malarmado sin tiam demandas, kio fariĝos la vivo, se la homoj hodiaŭ ne kapablas malarmadi. Ĉu homeca vivo ankoraŭ eblos, kiam cento da tiaj satelitoj rondiros minace ĉirkaŭ nia planedo ?

Cl.- La progreso en armada tekniko havas diplomatan konsekvecon. Hodiaŭ nur du landoj kapablas asekuri sian nacian defendon : Usono kaj Sovetio. Ĉiuj ceteraj vidas sian nacian defendon malnaciigite.

A.- La tekniko kondukis la militarton en senelirejon. Pro tio la malarmada problemo ĉiujare pli urĝas. Hodiaŭ la du granduloj hezitas antaŭ ol orbitigi bombsatelitojn. Tiu hezitado lasas al ni iom da tempo por organizi la pacon.

Cl.- Sinjoro Jules Moch venas al la dua ĉapitro. Li unue rimarkigas, ke la ĉefaj malakordoj, kiuj longe dividis ambaŭ grandulojn : Usono kaj Sovetio, grandparte malaperis. Antaŭ dekkvin jaroj la soveta malarmada koncepto absolute kontraŭis la usonan. Sovetio volis establi unu solan traktaton, kiu disvolviĝus sen haltiga ebleco de la komenciĝo ĝis la finiĝo de la malarmada procezo. Kontraŭe Usono akceptis eniri kaj diskuti novan malarmadan fazon nur post kompleta efektivigo kaj kontrolo de la deciditaĵoj.

A.- Ambaŭ tezoj estis neefektiveblaj. La malgrandaj potencoj faris kompromisajn proponojn. La soveta-usona konsento subskribita en 1961, nomata **konsento Zorin-McCloy**, faras, ke hodiaŭ la sovetaj tezoj tre proksimas la usonajn tezojn.

Cl.- Post konferenco okazinta en **Pugwash** en 1957 okcidentaj kaj orientaj delegitoj decidis regule renkontiĝi po du fojojn jare. Tiuj homoj deciditaj antaŭeniri sur la vojo al la malarmado estas hodiaŭ pli ol cent. Ili pretigas novajn solvojn kaj faras konstruigajn proponojn. Ilia projekto, pri divido de la landoj en ses zonoj kontroleblaj laŭ tre precizaj kondiĉoj unu post la aliaj dum ses jaroj, estas facile efektivebla.

A.- Fine sinjoro Jules Moch rimarkigas, ke la fakuloj pri malarmado estas spirite pretaj al la malarmado, dum la diplomatoj kaj politikistoj ne estas ankoraŭ maturaj por tiu metamorfozo. Ili kontraŭe evitas solvi la internaciajn konfliktojn por havi kaŭzojn por rifuzi la malarmadon.

Cl.- La venontan semajnon ni raportos pri la tria ĉapitro de tiu aktualega raporto de Jules Moch.

A.- Vi aŭdis Radio-Svislandon.

Cl.- Claude kaj Andrée Gacond diras al vi : Ĝis reaŭdo !

-oOo-